

LA INFORMILO

trimestriel
1^{er} trimestre
2010

N° 149
31 mars
2010

l'espéranto



la langue de l'amitié
sans frontières

esperanto



la lingvo de l'amikeco
sen landlimoj

ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale
ESPERANTO
regroupant
les départements
Meurthe-et-Moselle (54)
Meuse (55)
Moselle (57)
Bas-Rhin (67)
Haut-Rhin (68)
Vosges (88)

Maison des Jeunes
et de la Culture
" Philippe Desforges "
27, rue de la République
FR - 54000 NANCY

ABONNEMENT / ABONO
annuel / jara
14 €
eksterlando
18 €



au
'Gurtlerhoff'
avec
les amis ...



... devant le Parlement Européen ...

Probal
DASGUPTA

linguiste polyglotte, président de UEA, (Association Universelle d'Espéranto)
a été l'invité d'Espéranto France-Est

Il a profité d'une réunion à Rotterdam, siège de l'association mondiale, pour faire un petit détour par l'Alsace avant de rejoindre Calcutta. Il a découvert Strasbourg et Mulhouse pendant un mois de janvier plutôt glacial, mais la chaleur de l'accueil des espérantophones locaux autour d'un succulent baeckaofa aura réussi à lui faire oublier la rigueur du climat.

Des contacts très fructueux ont pu être noués (voir pages intérieures)..

Espéranto France-Est	esperanto France-Est	Orient-Franca Esperanto-Asocio	
La Informilo	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale ESPERANTO	Dulingva inform-bulteno pri la Internacia lingvo ESPERANTO	
Rédaction: Redaktoro:	PoI DENIS, 5, Chemin de Blamecourt, 55000 BAR LE DUC		
	poŝ-tel. 06 98 09 62 81	pol.denis@orange.fr	
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit Texte envoyé par courriel Document avec mise en page	un mois 3 semaines 2 semaines	avant la fin de chaque trimestre
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.			

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	telefono	Ret-adresoj
Prezidanto + PKK <i>Président + Cours par correspondance</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Jacques HERLÉ 1, chemin du Berger 57380 MAINVILLERS	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
Vic-sekretario <i>Vic-secrétaire</i>	S-ro Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE	03.89.82.37.62	kueny.robert@neuf.fr
Kasisto <i>Trésorier</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	03.89.45.62.89	andreo.ag08@free.fr
Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	thibias.jean-luc@wanadoo.fr libroservo.efe@wanadoo.fr
Redaktoro <i>Rédacteur</i>	S-ro PoI DENIS 5, Chemin de Blamecourt 55000 BAR LE DUC	06 98 09 62 81	pol.denis@orange.fr
Aliaj komitatanoj	S-ro Gilbert STAMMBACH	03.88.96.67.59	gilbert.stammbach@mageos.com
Asesseeurs	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36	liliber54@yahoo.fr
	S-ro Frédéric PORRETTI	03.69.77.07.24 06.15.70.15.73	popo68@evhr.net
	S-ro Roger DEGRELLE	03.82.21.92.40	roger.degrelle@wanadoo.fr
	S-ino Simone KIRY	03.89.57.68.10	jeanmarie.kiry@sfr.fr
	S-ro Cyrille HURSTEL	08.70.57.68.00	cyrille.hurstel@free.fr
	S-ino Ginette MARTIN	03.29.24.68.46	gimavo@wanadoo.fr
	S-ino Mireille ANTONI-TURCK		mirantur2@yahoo.fr

Abono al La Informilo →	Francio: 14 eŭroj Eksterlando: 18 eŭroj	← Abonnement à La Informilo
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	Esperanto France-Est	← Paiement par chèque au nom de
Pagoj per ĝiro al jena konto →	CCP 1997 72 W NANCY	← Paiement par virement au compte
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	Chèque bancaire ou postal ou changement d'adresse à envoyer au trésorier

Sommaire 149

p. 1 Président UEA à Strasbourg
2 ours
3 éditorial
4 cpte-rendu comité UFE
5/6 inscr. Congrès UFE / DEB
7/8 inscr. OSIĖK Herzberg
9 regard de la presse
10 visites universités
11 UK Hanoj – films UEA
Sam Green – Google
12 / 14 cpte-rendu IF
15 Boré – IJK Kiev – M. Serres
16 tour du monde Cyril et Rose
17 « jeepable » (suite et fin)
18 musée Suisse – concours litt.
théâtre Eo en Serbie

19 appel de l'ONU –
protestation francophone
20 globish
21 appel langue française
22 humour danois
23 journée de la f. – Hiroshima
24 Monte-Cristo / pasporta servo
25 memore al I.Szerdahelyi
26 île de Pâques, texte Jaci
27 / 28 libro-servo
29 page du trésorier
30 anecdotes
31 distra angulo
32 photothèque

ISSN 0291 6037 trimestriel
bulletin d'information bilingue sur l'espéranto
édité par l'association culturelle
Esperanto France-Est
MJC Philippe Desforages – 27 rue de la République
FR - 54000 NANCY
Directeur de la publication : **Edmond LUDWIG**
Rédacteur : **PoI DENIS**
dépôt légal : **31 mars 2010**
imprimé par l'Office Central de Coopération à l'Ecole
Place de l' Ecole Normale, FR - 55000 BAR-le-DUC
N° CPPAP : 0409 G 83517



Estimataj,

Ĉi-numere mi ne proponas al vi longan alvokon ! En mia lastnumera angulego vi legis pri la proponitaj laborprojektoj, inter ili pri turismo. Pri tiu ero mi ĉi-angule ŝatus insisti. Mi ja ne imagas, ke tujtuj ni povos prezenti al la ne-esperantista publiko mapon de nia regiono kun vizitindaĵoj malkovreblaj per Esperanto, sed ni iom post iom aldonu urbojn, pejzaĝojn, monumentojn, artaĵojn, muzeojn, ktp. Tiel aperos la utileco de nia lingvo kaj per tiu



utileco ni certe kapablos varbi pli da homoj al nia kara lingvo.

Cetere : *kial vi ne vizitus Strasburgon kun viaj geamikoj esperantistaj por malkovri mem, kiel funkcias la esperantlingva versio de la komentoj sur la turismaj ŝipoj.* Eble tio donos al vi ideojn por agadi ĉi-cele en via urbo aŭ regiono.

Edmond LUDWIG

esperanto
France-Est

Ni rememorigas al vi la retejon de nia asocio Esperanto France-Est

<http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr>

Krome eblas ankaŭ atingi ĝin per

<http://esperanto.france.est.free.fr>

Vi estos informitaj ne nur pri la vivo de nia asocio sed ankaŭ pri aktivadoj de la lokaj grupoj, de unuopuloj ... kaj pri Esperanto ĝenerale !

Multaj ligoj ebligas al vi trovi aliajn interesajn retejojn en Francio kaj en la mondo
La nova rubriko "nos albums photos" revivigas okultrafe regionajn eventojn... kaj alilokajn !
indas ofta vizito !

pour vous initier à la seule
vraie langue
internationale, pour vous perfectionner
ou éprouver le plaisir rare de converser
en espéranto...



→ nos stages, nos congrès,
nos rencontres, nos voyages...




apprendre
l'espéranto

rapidité ...
efficacité ...

- ★ un matériel adapté
- ★ une technique éprouvée
- ★ un réseau d'animateurs compétents
- ★ un savoir immédiatement opérationnel

"☆☆☆ ?...
-☆☆☆☆ !"

deux maîtres-mots
de notre cours
par correspondance !...



chez soi !

Edmond LUDWIG
26, route de la Schlucht
68140 STOSSWIHR
03 89 77 52 55

une diffusion
sur toute la région
...et au-delà !



El nacia komitat-kunveno ...



Okazis komitat-kunveno de **Esperanto-France**, la 31an de januaro 2010 en Parizo, ĉe la sidejo, dum kiu mi reprezentis nia federacion. Jen elĉerpo pri punktoj, kiuj povas interesi vin.



Nova banko - *Esperanto-France* nun havas konton ĉe la banko *NEF*. Oni instigas al monĝiro prefere ol sendo de bankĉeko. Baldaŭ estos fermita la malnova konto ĉe la banko La Banque Postale.

Serĉado de novaj estraranoj - Laborgrupo sabate provis trovi solvon al tro malofta apero de kandidatoj por estraraniĝi. Ĉefa decido estis ke enketo akompanos la jarraporton por peti opinion de la membroj kaj vekti intereson.

Kontoj 2008-2009 kaj buĝeto 2009-2010 - Nun membras 485 homoj. Fariĝis unua relanĉo fare de Véronique Bichon per rilato al la federacioj. Komenciĝas dua relanĉo per letero sendota al 450 homoj. La prezidanto proponis trian relanĉon, laŭ kiu la federacioj rekontaktu la homojn surbaze de la listo de la dua relanĉo ĉar necesas 200 pliaj membroj al la asocio por simple ekzisti. Claude Longue-Épée avertis, ke la membrolistoj komunikitaj al la federacioj ne estis ĝisdatigitaj (ili enkalkulas mortintojn). La prezidanto petas, ke la federacioj indiku la nomojn de la mortintoj al la sidejo, kaj la sekretario por membrolista ĝisdatigo.

Klubo 2000 - Du eblecoj estis diskutitaj por *Klubo 2000* : 1° landa interasocia peticio al la parlamento ; 2° konkurso laŭ la svisa ekzemplo. La komitato opinias, ke tiun konkurson povus fari federacio prefere al Esperanto-France, kiu tamen povus monhelpi. La proponita buĝeto por la peticio estas 15 000 euroj dividota kun *Sat-amikaro*. Post vigla diskuto, mi sukcesis haltigi tiun agadon, kiu tute ne helpos rompi niajn limigojn. Ĉar tiu temo estis diskutota, mi devis unue klarigi por ke la komitato agnosku la malfortojn de Esperanto, vortumita tiele « ni ne havas sufiĉe da okazaĵoj por ĉiutaga uzo de Esperanto », kaj samtempe ne decidus elspezi por agado kiu ne « helpos krei okazaĵojn por ĉiutaga uzo de nia lingvo ».

« *Le Monde de l'espéranto* », « *Okazas* » « Okazas » estas ret-iĝanta por esti kunfandata kun « *Verda Krabo* » (3 000 abonintoj). Ĝi estos retletera kaj papera. « *Le Monde de l'espéranto* » de nun estos publikigita kvar fojojn en jaro kun pli da paĝoj. Jara kvanto da paĝoj ne ŝanĝiĝos.

Strategio de UFE - Mi raportis pri la sabata kunveno pri tiu temo. La limigo de la sistemo estas ke ni havas « maltro da okazoj por utiligi Esperanton ĉiutage ». Tamen tiu kunveno ne kapablis trovi brilajn ideojn. Restas do la demando : « kion oni injektu en la sistemon por okazigi pliboniĝon ? ». Laboro restas farenda je tiu flanko, eble en Kaiserslautern. La komitato decidis, ke oni refaru novan opini-enketon pri kono de Esperanto. Ankaŭ longa kaj grava temo estis « kiel plifaciligi la turneojn de eksterlandaj prelegantoj ? ».

Staĝoj por instruantoj - En aprilo 2010, en Tuluzo, okazos metodika seminario. Rodanalpa Federacio organizos tian staĝon en Aix-les-Bains.

Propono de Universala Kongreso en Lille - La Nordfrancia Federacio kandidatas por akcepti la 100^{an} Universalan Kongreson en 2015 en la urbo Lille.

« *Eta Princo* » - Estos eldonitaj 2 000 ekzempleroj (500 por KEA, 1 500 por UFE). Profito el vendoj al UEA kaj FEL estos dividita inter UFE kaj KEA ; profito el vendoj en Eŭropo estos por UFE ; profito ekster Eŭropo estos por KEA.

La 13an de februaro 2010.

Via reprezentanto ĉe la komitato de *Esperanto-France*,

Cyrille Hurstel

cyrille.hurstel@free.fr

0950 57 68 00

FRANC-GERMANA KONGRESO

La Informilo 149 – paĝo 5

EN KAISERSLAUTERN!

21-24A DE MAJO 2010



ALIGU!

Al la tradiciaj kaj statute devigaj kunvenoj aldoniĝos **prelegoj, forumoj, diskutrondoj...**

Okazos **distras vesperoj** kun artistoj el Germanio kaj Francio, kaj verŝajne ankaŭ el aliaj landoj.

Denove okazos **movada foiro** en la komenca vespero.

Funkcios **libroservoj**.

Oficiala fino de la kongreso estos lunde (24-05-2010) per solena fermo post la tagmanĝo. Post ĝi okazos **ekskurso** posttagmeze kaj tuttaga **ekskurso** dum mardo (25-05-2010). Detaloj sekvos.

La kongresejo, Edith-Stein-Haus, estas **en la koro** de Kaiserslautern en agrabla ĉirkaŭaĵo (piedira zono). Multaj restoracioj, kafejoj, terasoj apude. Hoteloj ne estas tre for.




La urbo Kaiserslautern estas **facile atingebla** el Francio. Rektaj trajnoj el Parizo.

La **loĝadon** transprenos la turisma servo de la urbo. Ni rekomendos al vi ĝustatempe favorprezajn eblojn. Same sekvos informoj pri antaŭmendendaj komunaj manĝoj kaj ekskursoj.

Priatentu : post la ricevo de via aliĝilo, UFE sendos al vi duan specifan dokumenton kun informoj por **loĝado, manĝoj kaj ekskursoj**

esperanto
France

4 bis rue de la Cerisaie 75004 PARIS
À 50 m du métro Bastille
Tel. 09 51 77 18 33 (tarif local) • Fax 01 42 78 08 47
info@esperanto-france.org



www.esperanto.de

STADT
KAISERSLAUTERN

Aligilo (plenigenda kaj sendenda al **Esperanto-France**)

Familia nomo

Persona nomo.....

Naskiĝdato Sekso vira / ina

Membro de UFE : jes - ne

Samadresulo(j).....

Strato

Poŝtkodo urbo

Ŝtato.....

Telefono

Ret-adreso

 mi ne akceptas ke mia adreso kaj retadreso aperu en la kongresa libreto.**Kotiztabelo** (elektu vian kotizon laŭ via situacio)

1) Plenkreskulo super 30 jaroj

Ĝis 31-03-2010 : 60 € / 45 €Post 31-03-2010 : 80 € / 60 €

(la dua prezo estas reduktita kotizo por samadresulo/handikapulo/sensalajrulo).

2) Junulo (naskita inter 01-01-1980 kaj 31-12-1994) : 30 €3) infano (naskita inter 01-01-1995 kaj 31-12-2004) : 10 €

4) Taga bileto

Plena kotizo : vendrede 15 €, sabate 30 €, dimanĉe 30 €, lunde 15 €Redukt. kotizo : vendrede 10 €, sabate 25 €, dimanĉe 20 €, lunde 10 €

Mi aliĝas al la kongreso de Esperanto 2010 en Kaiserslautern.

Mi pagas mian kotizon laŭ la supra tabelo de € plus € donaco por la kongresa kaso, entute € (donacantoj ricevos ateston por franca imposto.)

je la (dato) :

al jena konto : UFE-konto (ufea-s) / per mia UEA-konto (precizigu "Kaiserslautern 2010")aŭ per ĉeko. Subskribo :

Mi planas alveni je (dato : horo :) kaj forveturi je (dato : horo :)

per aŭto / trajno / ruldromo : Mi proponas sidlokojn en mia veturilo.

Mi intencas partopreni en la movada foiro (vendrede vespere) por jena asocio :

.....

La aliĝilon sendu :

- rete al kaiserslautern@esperanto-france.org
- aŭ papere al Esperanto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, 75004 Paris
- ankaŭ eblas aliĝi rete, ĉe <http://esperanto-france.org>

Pagojn sendu :

- ĉeke aŭ ĝire CCP 0085535D020 al Esperanto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, 75004 Paris
- aŭ al la UEA-konto de UFE "ufea-s" (nepre tiam informu la organizanton pri via pago !)

kaiserslautern@esperanto-france.org



Internacia Esperanto-Konferenco – 2010

de la 17-a ĝis la 23-a de julio en Herzberg, Germanio

Temo: Kial Esperanto estas revolucia lingvo?

Konstanta adreso: Eric Laubacher, kasisto de OSIEK, 1 rue Louis-Antoine de Bougainville, F-78180 Montigny-le-Bretonneux.

tel: +33 1 30 96 67 91 retadreso: kasisto@osiek.org


Loka adreso: Interkultura Centro Herzberg (ICH), Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz

tel: +49 5521-5983 - fakso: +49 5521-5983 - retadreso: esperanto-zentrum@web.de

Loko

Purcentigata germana historio kaj benita naturpejzaĝo sur la suda flanko de la Harc-montaro renkontiĝas en la tradicia urbo Herzberg [Herberg], kune kun la aldonaj aerkaraclokoj Lonau kaj Sieber, kaj la ripozlokoj Pöhlde kaj Scharzfeld. Okcidente situas la impona konstruaĵo de la 950-jara Welfenschloss, la plej granda fakturata kastelo en Malsupra Saksio.

Herzberg estas de 2006 « La Esperanto-urbo ».



Kiel atingi Herzberg-on

Aviadilo: La flughaveno de Hannover estas la plej proksima (120 km), sed tiu de Frankfurt (270 km) enhavas stacidomon.

Per veturilo: El la nordo Herzberg estas atingebla per aŭto sur aŭtovojo A7 ĝis la eliro ĉe Seesen, kaj de tie sur la B243 ĝis Herzberg. El la suda direkto oni uzas A7 ĝis la eliro Göttingen Nord, de tie B27 ĝis Herzberg. El la direkto Saksio-Turingio oni plej bone pasu tra Nordhausen sur la B243 ĝis Herzberg.

Fervojo: Stacidomo Herzberg am Harz. De la nordo tra Hannover, Kerenzen, Northeim. De la sudo tra Kassel, Göttingen, Northeim. De la okcidento tra Altenbecken, kaj Northeim. De la oriento tra Halle kaj Nordhausen.

Herzberg am Harz



Internacia Esperanto-Konferenco – 2010

de la 17-a ĝis la 23-a de julio en Herzberg, Germanio

Temo: Kial Esperanto estas revolucia lingvo?

Aligilo

Tonu, kompletigu kaj sendu tiun ĉi parton al Eric Laubacher, kasisto de OSIEK, 1 rue Louis-Antoine de Bougainville, F-78180 Montigny-le-Bretonneux.

Ĉiuj prezoj estas en eŭroj.

S-ro S-ino (Familia nomo).....

(persona nomo)

(kompleta adreso)

(retadreso)

Mi mendas logadon por la noktoj: (16) 17 18 19 20 21 22 (23) en:

Horelo Jägerhof, en unuflita duflita ĉambro

Horelo Englischer Hof, en unuflita duflita ĉambro

Horelo Landhaus Schulze, en unuflita duflita ĉambro

Fera apartamento

Privata domo, en unuflita duflita ĉambro

Tendumado

Mi mendas rekte Mi petas helpojn por mendi rekte Mi volas mendi samtempe kun mia aliĝo al la konferenco.

Mi petas oficialan invitleteron al la konferenco.

Mi petas aldonajn informojn por atingi la konferencojn.

Aliĝkotiĝo (en €)

La Jara Kотиzo (JK) al OSIEK estas egalvaloro de 25 poŝtmarkoj por enlanda letero. Por OSIEK-anoj, la aliĝkotiĝo al IEK estas obligo de la JK, kun minimuma kaj maksimuma valoro.

Periodo	< 2010-02-28				< 2010-04-30				Poste	
	Min	Norm	Maks		Min	Norm	Maks	Min	Norm	Maks
OSIEK-ano	20€	6*JK	60€		25€	7.5*JK	75€	35€	10*JK	100€
Nemembro	80€		100€		100€		120€			

- Rabato 50 %-a por junuloj ĝis 26 jaroj, handikapuloj.
 - Rabato 30 %-a por samadresa kunulo de la aliĝinto.
- La kотиzo inkluzivas: organizaĵajn elspezojn, konferencajn materialojn, partoprenon en la programo, vizitojn en la urbo, interkongan vespermangon. Ĝi ne inkluzivas loĝadon, nek mangojn. La kottiĝo estas ne repagebla.

Solidareca fonduso

Estas bedaŭrinde, ke ekonomiaj cirkonstancoj tre malhelpas kelkajn samideanojn partopreni kaj kontribui al niaj konferencoj. Per via pago al "Solidareca fonduso" ni povas malaligi konferencajn kaj loĝejajn kottiĝojn al nivelo akceptebla por ili.

Bilanco

- Mi pagas por konferenca kottiĝo:€
- por loĝado (se vi ne mendas rekte):€
- por solidareca fonduso:€
- Enaŭte :€
- Mi pagas samtempe kun tiu ĉi aliĝilo:€
- Restas al mi por pagi antaŭ 1^o de junio 2010:€

Kiel pagi (eventualaj bankkostiĝoj estos eliritaj)

- Poŝtkonto de la kasisto Eric Laubacher: n^o 1 399 87 R PARIS
IBAN: FR47 2004 1000 01013998 7R02 028 BIC: PSSTFRPPPAR
- UEA-konto de OSIEK: osie-h FEL-konto de OSIEK: osie-h

Dato..... Subskribo.....

Konferencio

La konferenco okazos en restoracio Artemis, Bahnhofstrasse 3 (apud la stacidomo).

Loĝado

- Hotelo Jägerhof, ekde 30 € por unu persono (kun matenmanĝo) – 2,5 km de konferencio.
- Hotelo Englischer Hof (4*), ekde 44 € por unu persono (kun matenmanĝo) – 5 km de la konferencio - <http://englischerhof.de/>
- Hotelo Landhaus Schulze, ekde 44 € por unu persono (kun matenmanĝo) – 1 km de la konferencio - <http://www.landhaus-schulze.de/>
- FERIAJ apartamentoj estas haveblaj ekde 32 € tage. Ili estas kutime por 2-4 personoj ekipitaj. La prezo validas kutime sendepende de la nombro de loĝantoj. Kutime oni postulas restadon dum unu semajno. Sen matenmanĝo, sed kutime estas kuirrejo en la apartamentoj. Listo haveblas ĉe <http://www.herzberg.de>.
- Privataj ĉambroj ekde 15 € por unu persono. Listo haveblas ĉe <http://www.herzberg.de>.

La prezoj ne estas garantiitaj. Vi povas rekte mendi vian loĝadon per la reto (prefere).

Mangoiĝo



La konferencio estas restoracio, kiu proponas bongustan bufedon tagmanĝon je 9,50 €, ankaŭ taŭgan por vegetaranoj. Kompreneble ĉiam eblas mangi libere laŭ la karto de la restoracio. En Herzberg estas multaj restoracioj, kelkaj kun Esperanto-menukartoj.

Dumkonferenca programo

Matene: tema programo, statuta programo, libroservo, kursoj por komencantoj.

Posttagmeze kaj vespere:

- Interkona vespero.
- Urborondirado.
- Naĝado en Jues-lago.
- Vizito al ICH (Interkultura Centro Herzberg).
- Vizito al Unukornula Groto.
- Kaj multaj aliaj surprizoj...





Le président mondial des espérantistes en Alsace

Le linguiste indien Probal Dasgupta, 55 ans, est aussi le président de l'association mondiale d'espéranto. Il est pour la première fois en Alsace, pour nouer des contacts en faveur de la langue «équitable» conçue en 1887.

■ *«Bonan vesperon! – Vetero estas malvarma»* (Bonsoir! – Le temps est froid): c'est en espéranto que s'échangent les salutations dans ce restaurant strasbourgeois, mercredi soir. L'invité d'honneur est de la quinzaine de convives est en effet une haute personnalité de l'espéranto. Probal Dasgupta, accueillie par le groupe Espéranto Strasbourg.

«Après trois mois, j'étais tout étonné de me découvrir très à l'aise dans la langue»

Ce linguiste et lexicologue de Calcutta préside en effet depuis 2007 l'association mondiale d'espéranto. Celle-ci, fondée en 1908 à Genève, fédère aujourd'hui 70 associations nationales de pratiquants et promoteurs de la langue internationale.

Hier, Probal Dasgupta devait visiter l'Institut de traducteurs et interprètes et de relations internationales de Strasbourg (ITI-RI). Aujourd'hui, à Mulhouse, il a prévu de rencontrer le doyen de la faculté des Lettres, qui a créé cette année un cours optionnel d'espéranto. Par ail-



Probal Dasgupta est aujourd'hui à Mulhouse, où l'université de Haute-Alsace a ouvert un cours d'espéranto. (Photo DNA – Bernard Meyer)

leurs, il devait faire deux visites en espéranto, grâce aux audioguides de la ville d'Obernai et des vedettes du Port autonome de Strasbourg, qui ont prévu un canal dans cette langue.

«Mon rôle de président est d'écouter les groupes et les pratiquants de l'espéranto dans tous les coins du monde», précise M. Dasgupta. *Mais je suis aussi vice-président de l'académie d'espéranto: à ce*

titre, je peux être amené à parler aussi de la langue». L'un des défis actuels, explique-t-il, est de toucher tous les «nouveaux espérantistes» qui se sont mis à cette langue sur Internet, sans approcher les groupes constitués.

Lui-même a appris l'espéranto à 13 ans: *«J'étais curieux des langues, mais sans patience. J'ai essayé l'indonésien, le japonais, l'arabe, chaque fois deux ou trois mois, et*

je laissais tomber. Mais pour l'espéranto, après trois mois, j'étais tout étonné de me découvrir très à l'aise dans la langue. Elle est si facile! Donc, j'ai continué...»

Pour l'accueil des touristes

L'association locale, Espéranto Strasbourg (héritière du Cercle culturel d'espéranto fondé en 1907) organise des cours, des rencontres, des soirées culturelles et des actions de promotion (*). Présidée par Bruno Flochon, elle souhaite aussi assurer la présence de l'espéranto pour l'accueil des touristes: *«Nous pensons par exemple, explique Cyrille Hurstel, vice-président, à des cartes de restaurants ou à d'autres audioguides, comme ceux du Haut-Koenigsbourg».* Jacques Fortier

(* *Espéranto Strasbourg, chez Bruno Flochon, 27B, rue de la Glacière, 67300 Schiltigheim (adresse postale) / © 06 60 58 00 40 / esperanto-strasbourg.net Une association existe aussi à Mulhouse, présidée par André Grossmann, dont le siège est à l'Espace 110 d'Illzach (esperanto.free.fr)*

DNA - vendredi 15 janvier 2010

Obernai / Rencontre

La cité en espéranto

Et si l'espéranto pouvait aussi servir au tourisme ? L'idée était en tout cas testée cette semaine et à Obernai par le président-membre de l'association mondiale d'espéranto.

Cyrille Hurstel, un Obernois espérantiste, a fait visiter sa ville au président de l'association mondiale d'espéranto. En espéranto ça va de soi. (Photo DNA)

«Obernai estas tre bela urbo.» Comprenez: *«Obernai est une très belle ville.»* C'est de l'espéranto, et quand c'est le président de l'association mondiale d'espéranto qui prononce la phrase, on est au moins sûr qu'elle est correcte.

En tant qu'Alsacien d'Obernai, il y a de quoi être honoré de cette sentence émise par une personnalité de cet acabit. Probal Dasgupta, 55 ans, est un Indien, professeur à l'institut de statistiques de l'Inde à Calcutta. Mais c'est en tant que linguiste et président des espérantistes qu'il vient d'être reçu à Strasbourg, dans le cadre de travaux du groupe *Espéranto Strasbourg*.

Une application pour le tourisme avec les audioguides

A côté des réunions, le tourisme figurait au programme. Et comme le tourisme en Alsace passe par Obernai, rien que de très normal de rencontrer Probal Dasgupta dans la cité de sainte Odile. D'autant plus que le vice-président de *Espéranto Strasbourg*, Cyrille Hurstel, est Obernois. Cyrille Hurstel* a même traduit en espéranto les plaques apposées sur les principaux

monuments de la ville. Les commentaires sont téléchargeables sur internet. Et ça marche : le président mondial a pu tester le commentaire sur un MP3.

L'espéranto pour favoriser le tourisme? Pourquoi pas. C'est en tout cas ce à quoi travaille l'association alsacienne. Cyrille Hurstel évoque les audioguides ainsi que les cartes de restaurant traduites pour les espérantophones. Les audioguides ne sont pas un gadget en l'occurrence. Car l'Obernois cite des groupes espérantistes qui viennent régulièrement dans la ville du piémont. « *Si je n'ai pas le temps de les guider personnellement, on recourt au système de l'audioguide.* »

Où la langue mondiale, inventée en 1887, se révèle comme un vecteur de communication aussi pratique que les autres. Et même plus pratique... parce que plus facile à apprendre.

Claude Robinet

(* On peut consulter le site de Cyrille Hurstel : <http://benecyril.free.fr>

Probal DASGUPTA, la prezidanto de UEA, en la universitato de Mulhouse

Okaze de sia vizito al Strasburgo (vidu la gazetartikolon aliloke en LA INFORMILO) la prezidanto de UEA, Profesoro *Probal DASGUPTA*, ankaŭ vojaĝis al Mulhouse kune kun Cyrille HURSTEL. Mi havis la plezuron akcepti lin ĉe la stacidomo de Mulhouse. De tie ni veturis al la universitata areo de Mulhouse.

Unua renkontiĝo okazis en *Ecole de chimie*, kies direktoro, Sinjoro *Serge NEUNLIST*, prezentis sian altlernejon. Nia delegacio klarigis, ke Esperanto iom post iom antaŭeniras en la profesia vivo kaj ke ankaŭ studentoj pri kemio estas bonvenaj en la universitata kurso en Mulhouse. Sinjoro NEUNLIST ankaŭ komprenis, ke eventuala Esperanto-klubo de studentoj estus interesa pluso en la internaciaj rilatoj.

En la najbara *Fakultato pri Beletro, Lingvoj kaj Homaj Sciencoj* nin atendis la dekano, Sinjoro *KERDILES*, en kies oficejo ni havis duhoran interesan diskuton, dum kiu li konfirmis, ke li ĉion faros por la daŭrigo de la Esperanto-kurso kaj eĉ por la kreo de dua nivelo en septembro 2010. La diskutoj pluis en la universitata restoracio "*Auberge de l'Illberg*" kie bongusta manĝo atendis nin.

Mi ne silentu pri la fakto, ke Probal DASGUPTA bonege regas la francan lingvon.

Edmond LUDWIG



... pri elstara "dulanda" kongreso ...

espéranto
France

Kiel vi supozeble jam legis, la venonta kongreso de **Espéranto-France** okazos samtempe kaj samloke kiel la kongreso de **Germana Esperanto-Asocio**, de la 21a ĝis la 24a de majo, en **KAISERSLAUTERN** en Germanio.

deutscher esperanto-bund e. v.
germana esperanto-asocio r. a.
geb

Unua inform-dokumento kun aliĝilo kuŝas en ĉi tiu bulteno.

La urbo Kaiserslautern estas facile atingebla. Bonaj trajnaj konektoj.

La kongresejo estas en la koro de Kaiserslautern, en agrabla ĉirkaŭaĵo (piedira zono). Multaj restoracioj, kafejoj, terasoj apude. Hoteloj ne tre for.



Al la tradiciaj kaj statute devigaj kunvenoj aldoniĝos prelegoj, forumoj, diskutrondoj. Okazos distraj vesperoj kun artistoj el Germanio kaj Francio, kaj verŝajne ankaŭ el aliaj landoj. Denove okazos movada foiro en la komenca vespero. Funkcios libroservoj.


Oficiala fino de la kongreso estos lunde (24-05-2010) per solena fermo post la tagmanĝo. Post ĝi, okazos ekskurso posttagmeze kaj tuttaga ekskurso dum mardo (25-05-2010). Dua inform-bulteno kun kompleta programo atingos vin post via aliĝo. (antaŭmendenda, komunaj manĝoj kaj elskursoj).

La loĝadon transprenos la turisma servo de la urbo.

Ni rekomendos al vi ĝustatempe favorprezajn eblojn. Same sekvos informoj pri antaŭmendendaj, komunaj manĝoj kaj elskursoj, en la dua

Ne hezitu tuj aliĝi!


la Universala Kongreso en 2012 okazos en Hanojo



La elekto de **Hanojo** kiel la urbo de la *97-a Universala Kongreso de Esperanto en 2012* estis la plej rimarkinda decido de la Estraro de UEA, kiu kunsidis en sia plena konsisto en la Centra Oficejo ekde la 10-a ĝis la 12-a de januaro. Ĝis la lasta momento, ankaŭ la korea urbo Busan konkursis, kun alloga oferto, pri la rajto okazigi



la Kongreson, sed post longa diskuto la Estraro decidis favore al la vjetnama ĉefurbo. La Esperanto-movado de Vjetnamio havas jam longan historion, sed la Universalan Kongreson ĝi gastigos por la unua fojo.



Transdono de la festlibro al *Tonkin* ankaŭ ĉe "UEA-viva"

La plej nova eldono de la filmĵurnalo "*UEA-viva*" estas dediĉita al la publikigo de la festlibro "*La arto labori kune*", kiun UEA eldonis okaze de la 70-a datreveno de *Humphrey Tonkin*. Prof. Tonkin festis sian vivjubileon la 2-an de decembro de 2009, sed la transdono de la festlibro estis aranĝita la 9-an de januaro en la Centra Oficejo de UEA, lige kun lia ĉiujara vizito al *Biblioteko Hodler* pro

bibliografia laboro por la usona *Asocio de Modernaj Lingvoj*.

La 10-minuta filmo redonas la varman etoson de la transdona ceremonio per fragmentoj el ĝiaj programeroj, i.a. el la prelegoj de la du redaktoroj de la festlibro, *Ulrich Lins* kaj *Detlev Blanke*. La redaktoroj prilumis kaj la multflankan aktivadon de la jubileulo kaj la enhavon de la impona 900-paĝa volumo, al kiu kontribuis pli ol 100 aŭtoroj.

La filmo videblas ĉe: <http://www.youtube.com/UEAviva#p/a/u/0/hzNIAD7ve38>

Filmo de Sam Green pri "utopioj premieris"



En la usona filmfestivalo *Sundance* okazis fine de januaro la premiero de la filmo "*Utopia in four movements*" de reĝisoro *Sam Green*.

La titolo de la filmo ("*Utopio en kvar movimentoj*" aŭ "*Utopio en kvar movadoj*") referencas al la tradicia konstruo de simfonio kaj al sociaj movadoj.

Unu el la movadoj estas la esperantista, kiun Sam Green observis kaj filmis i.a. en kongreso de la usona landa asocio ELNA kaj en la **Universalaj Kongresoj** en *Florenco*, *Jokohamo* kaj *Roterdamo*. La nuna tempo estas laŭ Green malamika al utopioj, sed malgraŭ tio diversaj idealistoj plu persistas, ne perdante siajn idealojn, kaj la simpatio de la reĝisoro estas ĉe ili.

Sam Green estas renoma kinisto, kies dokumenta filmo "*The Weather Underground*" (2003) pri la tiumoma radikala usona movado en la 60-aj kaj 70-aj jaroj estis nomumita por *Oskaro*. Multaj esperantistoj helpis al Green en diversaj stadioj de la estiĝo de lia nova verko. Li ricevis asiston i.a. de ELNA kaj ESF.

La Centran Oficejon de UEA li unufoje kontaktis fine de 2005. Dum la Internacia Filmfestivalo de Roterdamo en januaro 2006, en kies programo estis unu el liaj filmoj, Green vizitis la Centran Oficejon por esplori en la Biblioteko Hodler kaj por prepari ĉeston de sia skipo en Universalaj Kongresoj.

Retejo de la filmo: <http://utopiainfourmovements.com>



Les 15 et 16 décembre, plus de **850 000 personnes**, c'est-à-dire **cent fois plus** que la moyenne journalière, ont visité la page sur Zamenhof de la version en anglais de **Wikipedia**, ceci grâce au lien de la page d'accueil *Google* affichée le 15 décembre avec le drapeau de l'espéranto sur son logo : <http://stats.grok.se/en/200912/L.%20L.%20Zamenhof>

La 15an kaj 16an de decembro, pli ol **850 000 personoj**, t.e. **centfoje pli** ol dum la meznombro de ordinara tago, vizitis la paĝon pri Zamenhof de **Wikipedia** en angla lingvo, dank'al la ret-bildo de *Google*, sur kiu vidiĝis la esperanto-flago

jaroj animas *Mikaelo Bronŝtejn* el Rusio. Ĉeestis dudek novuloj, kiuj rapide integriĝis al la grupo de jam konataj kaj regule partoprenantaj esperantistoj. La plej foraj venis el Japanio, Usono, Israelo, Rusio. . .

La libroservo de FEL (Flandra Esperanto-Ligo) ofertis plurajn librojn, muzikdiskojn kaj aliajn esperantaĵojn. Pri-zorgis ĝin *Tina* kaj *Paul Peeraets*. La "Knajpa" etoso apartenas al la plej gajaj. Ĉi-foje Harald, Jeon-ok, Vida, Bruno kaj HDP servis bieron, vinon, koktelojn. . .

Aŭtorajn horojn prezentis *Lena Karpunina* kaj *Mikaelo Bronŝtejn*. Pri la situacio en Afganio parolis *Ulrich Brandenburg*, pri Norda Koreio kaj porka gripo *Harald Schicke*, pri kajakado ĉirkaŭ insuloj *Ugo* kaj *Annarosa* el Italio, artan en-



Dagestana vespero: tipa kostumo



Rusa vespero: Inga dancas

Rusa koncerto: kantas Inga kaj Vera, muzike akompanas Sergeo kaj Mikaelo



La tutaga ekskurso gvidis la IF-anojn al la proksima urbo Nurenbergo (germane *Nürnberg*), la lulilo de la Esperanto-movado en Germanio. Tie vivis fine de la 19a jarcento Leopold Einstein, fame konata pioniro de Esperanto. Li fondis la unuan Esperanto-asociacion kaj eldonis la unuan Esperanto-gazeton. La urbo-gvidadon preparis membroj de la nurenberga grupo, kiu ankoraŭ hodiaŭ estas unu el la plej aktivaj en Germanio.



Abunda kaj bongusta tagmanĝo en Nürnberg en konata restoracio "Bratwurst-Röslein"

pakadon per tukoj prezentis kaj pri ties historio parolis *Masumi* kaj *Tacuo Huĝimoto* el Japanio, memorindan jubilean IF-on en retrospektivo prezentis *Brian Moon*. Krom tio okazis vico da interesaj prelegoj. Estis prezentita baletto, manĉo, pianludado, matena gimnastikado. Oni ofertis kurson de desegnado, paroligan kurson, ktp. Multaj interesiĝis pri vizito al la loka bierfabriko Ankerbräu, kie ĉiu vizitanto ricevis memore bierglasojn kaj kompreneble ili gustumis diversajn bierojn. Ankaŭ urbaj promenoj kolektis multajn interesulojn.

Pluraj profitis oferton de surloka saŭnado. Jam la trian fojon okazis IVU (Internacia Vintra Universitato) kaj la duan fojon Internaciaj ekzamenoj laŭ la nova metodo, gvidita de *Zsófia Kóródy* kaj *Peter Zilvar*.

Por danco-ŝatantoj *Liba* elektis muzikon en ritmo de flamenko kaj ŝi iniciatis lernadon de mazurko, kiu estis prezentita kun granda sukceso antaŭ la silvestra balo. Dum la tradiciaj silvestraj bufedoj kaj baloj ĉiam estas okazo bone manĝi, babili, amuziĝi, danci kaj bonvenigi la diversajn novjarojn de la ĉeestantaj partoprenantoj. La novjara promeno celis



Antaŭ ol komenciĝis la balo de la 31a de decembro, pluraj paroj lerte gvidataj de *Liba Gabalda*, prezentis al la cetera publiko dancon "Mazurko". Ili ricevis varman aplaŭdon de ĉiuj.



Mazurko ankaŭ postulis lertecon flanke de la fotantoj kaj filmantoj



Elena Sepikhanova per ĉarma rideto bondeziras okaze de novjariĝo en Dagestano

rondiron sur la ĉirkaŭurba murego, kiun gvidis *Floreal*. Li akompanis interesulojn al la 90 metrojn alta turo *Daniel* de kie bela vetero ebligis rigardon al la vasta ĉirkaŭaĵo kaj neĝkovrita urbo *Nördlingen*.

Krom la dagestana, rusa kaj la israela vesperoj dum kiuj ni estis regalitaj ne nur per kantoj, dancoj sed ankaŭ per tiulandaj bongustajoj ni ankaŭ festis la Zamenhofan 150-jaran datrevenon per interesa programo kaj ŝaŭmvino ofertita de nia organizanto *HDP (Hans-Dieter Platz)* al kiu ni tutkore dankas pro la brila organizado de IF-oj, kiuj iĝas jaron post jaro pli kaj pli perfektaj.

Kiel antaŭvidite, la festivalo estis ege sukcesa kaj mi invitas vin denove reveni ĉi-jarfine al la sama loko - fabela urbo *Nördlingen* - por festi la 27-an IF en agrabla kaj amika etoso. Dum la tuttaga ekskurso ni vizitos Munkenon.

Liba Gabalda

Li inventaris la "ZEO-jn" en la tuta mondo ... 

Raymond Boré, komisiito de UEA pri *Zamenhof / Esperanto - Objektoj (ZEO-j)* forpasis la 6-an de januaro en *Chambéry*, Francio.

Li naskiĝis la 19-an de oktobro 1925. Boré estis dum multaj jaroj kunlaboranto de *Hugo Röllinger* pri la registrado de ZEO-j.

En 2001, post la morto de Röllinger, Boré daŭrigis lian laboron kiel komisiito de UEA.

Boré ankaŭ vizitis multajn ZEO-jn por kompletigi sian kolekton de fotoj pri ili. En sia hejmurbo li atingis decidon de la urbaj instancoj nomi la placon, ĉe kiu li loĝis, *Skvaro Zamenhof*.

Pro la meritoj de Raymond Boré, la Estraro de UEA ĉi-jare premiis lin per *Diplomo pri Elstara Agado*, sed la sorto ne plu permesis aranĝi ĝian personan transdonon al li. En 2005 li ricevis ankaŭ la *Premion Ada Sikorska Fighiera*.

Boré estis dumviva membro de UEA ekde 1985, kaj delegito ekde 1986. Li estis ankaŭ mecenato de la Asocio i. a. kiel regula membro de *Societo Zamenhof* kaj ekde 2001 kiel Dumviva Patrono de UEA.

Pro malbona sanstato Boré rezignis kiel komisiito pri ZEO-j fine de la pasinta jaro. La Estraro de UEA nomumis kiel lian sekvantonlian longtempan helpanton *Robert Kaminski*.

Omaĝas al li D-ro Louis C. Zaleski-Zamenhof

Forpasis Amiko. Forlasis nin Samideano. Forlasis nin Homo modesta, kiu tutan sian vivon dediĉis al Esperanto, serĉante nenian personan gloron. Reciproke Esperanto lian vivon plenis.

Tra la tuta mondo li serĉadis ZEOjn, la Zamenhof / Esperanto - objektojn, kaj fiere ilin listigis. En sia urbo li kreis ankaŭ mem ZEOjn. La adreso de la hejmo sekve estiĝis Skvaro Zamenhof; danke al lia penado estis starigita en Chambéry la Zamenhof-monumento.

Per sia lasta volo li postlasis al mi imponan arkivon de fotoj kaj dokumentoj rilatantaj al Zamenhof kaj ankaŭ al liaj familianoj; pli ol tricent objektojn, ofte ununurajn, kolektitajn dum pluraj jardekoj.

Mi mem intencas postlasi siatempe tiun senkompare valoran kolekton al la Centro Zamenhof, lastjare inaŭgurita en Bjalistoko. La nomo de Raymond Boré estos sekve tiuloke eternigita apude de Zamenhofoj.

Adiaŭ Raymondo kara, ripozu en paco.



Internacia Junularo Kongreso - 2011 okazos en Ukrainio !!



TEJO ĝojas anonci, ke la **67-a Internacia Junulara Kongreso** okazos en *Ukrainio*. Tio estis decidita dum lasta reta estrarkunveno.

La aranĝo okazos en **julio 2011** proksime al *Kievo*, ĉefurbo de *Ukrainio*. La kongresejo troviĝas proksime al la *Kieva akvo-rezervejo* (grandega artefarita lago kun 922 km²).

La organizan teamon kreos **UkrEA** (Ukraina Esperanto-Asocio) kaj **ULEJ** (Ukraina Ligo de Esperantista Junularo).

Tio estos la unua IJK en *Ukrainio* - sed espereble kun rekorda nombro de partoprenantoj.

laŭ komuniko de *Lukasz Zebrowski* en [pri-ijk]

... Ça va mieux en le disant ...



" Actuellement, les savants, les publicistes, les journalistes parlent anglais. On voit sur les murs de Paris beaucoup plus de mots anglais qu'on ne voyait de mots allemands pendant l'Occupation.

Tous les gens qui ont une quelconque responsabilité, dans mon pays, ne parlent plus ma langue. Par conséquent, j'appelle le français la « langue des pauvres ». Et je la soigne comme je soigne en général les idées que j'ai sur les pauvres ".



Michel Serres

Cyrl kaj Roz', niaj du biciklantaj aventuremuloj, salutas nin el *Warrnambool* (Aŭstralio)

3an de marto 2010

(NB - ... sed la mesaĝo proponas reporteraĵon pri ilia antaŭa gastiĝo en *Singaporo*. Jen dulingva parto por inciti nian legantaron "aboni" la regulajn allogajn raportojn el niaj geamikoj! – retadreso fine de la artikolo)


« ... Vingt et un décembre, huit heures du mat. le réveil sonne déjà. Nous prenons à la hâte nos passeports et partons prendre le bus pour la capitale singapourienne, pendant que nos vélos se reposent pour deux jours dans une pension de Malaka, en Malaisie. Quatre heures après et deux cents kilomètres parcourus, nous arrivons à **Singapour**. Nous ne sommes plus qu'à 127 km de l'équateur.

Singapour est la capitale d'un des plus petits états au monde, citée en exemple pour sa réussite économique. Tout y est moderne, principalement dans l'extrême sud où se dresse toute une ligne de gratte-ciel.

Mais Singapour, comme tout le monde le sait, est surtout célèbre pour ses interdictions diverses et variées. Interdiction de fumer, de cracher, d'uriner dans la rue, de manger ou de boire dans les lieux publics, de jeter des ordures par terre, mais aussi de mâcher du chewing-gum sauf avis médical et sur présentation d'une ordonnance à la pharmacie. Interdit de klaxonner en ville, tiens, tiens, voilà qui pourrait renflouer les caisses des états indien et népalais où le klaxon est une institution nationale. Même certaines pratiques sexuelles pour hétéros sont interdites par la loi mais on n'a pas vu le panneau.

Le **durian** aussi est interdit dans les transports en commun et dans les hôtels portant le sigle durian interdit. Nous ne pouvons qu'être d'accord. Pour une fois que des français approuvent une interdiction!... Nous pensons même qu'il devrait y avoir une convention internationale pour l'interdire sur l'ensemble de la planète, à l'instar de ce qui se fait pour éradiquer les armes bactériologiques.

Le durian: cela ressemble à un hérisson géant, cela pique comme un hérisson, c'est en forme de boule



comme un hérisson mais ce n'est certainement pas un hérisson et cela sent mauvais comme un fruit pourri. Justement, c'est un fruit dont le nom signifie "qui pique". On mange l'intérieur dont la consistance s'apparente à du beurre. On en trouve partout, dans les gâteaux, les desserts, y compris sous forme de glace d'un litre, dont l'odeur nauséabonde traverse le couvercle en carton. Célèbre en plus! Dans le cœur touristique de la capitale singapourienne une esplanade abrite deux bâtiments grandioses avec auditorium, théâtres proposant les dernières nouveautés les plus branchées en matière d'art et où chacun des deux toits représente une coque de durian géant [...] ... ».

La dudek-unuan de decembro je la oka matene jam sonoras nia vekhorloĝo. Ni haste kunprenas niajn pasportojn kaj ni aliras buson al la singapura ĉefurbo. Dume, niaj bicikloj ripozas du tagojn en gastejo de Melaka, en Malajzio. Post kvar-hora busado kaj ducent kilometroj ni alvenas en **Singapuro**. Tiam, ni forestas de ekvatoro je nur 127 km.

Singapuro estas la ĉefurbo de iu el la plej malfrandaj ŝtatoj en la mondo, montrata kiel ekzemplo pro ĝia priekonomia sukceso. Ĉio modernas, precipe en la plej suda parto, kie staras linio da altegaj turoj.



Sed Singapuro, kiel ĉiuj scias, precipe famas pro ĝiaj diversaj kaj variaj malpermesoj. Malpermesite

fumi, kraĉi, urini surstrate, manĝi aŭ trinki en publikaj lokoj, surgrunden ĵeti rubaĵojn, sed ankaŭ maĉi maĉgumon, escepte je kuraca motivo kaj je prezento de recepto al apoteko. Egale malpermesite hupi en urbe, oh, oh, jen maniero por replenigi la ŝtatajn kasuojn de la barata kaj nepala ŝtatoj, kie hupado estas nacia kutimo. Eĉ iuj priseksaj agoj por aliseksemuloj estas malpermesitaj de leĝo sed ni vidis nenian rilatan ŝildon.

Ankaŭ **duriano** estas malakceptata en amastransportiloj kaj en hoteloj montrantaj la ŝildon duriano malpermesita. Ni povas nur plene konsenti. Ne tiom oftas, ke francoj konsentas kun malpermeso!... Ni eĉ opinias, ke neprus internacia interkonsento por malpermesi ĝin sur la tuta planedo, same kiel ekzistas por forigi bakteriologiajn armilojn.

Duriano: tio similas al grandega herinaco, tio havas herinacajn dornojn, ĝi havas buloformon kiel herinaco, sed ja ne temas pri herinaco. Kaj tio fetoras kiel putra frukto. Fakte ja temas pri frukto kies nomo signifas "pikanta". Oni manĝas la enhavon, kies firmeco pensigas je butero. Ĝi troveblas ĉie, en kukoj, en desertoj, ankaŭ je glaciajaj potoj unu-litrajn tra kies kartona kovrilo pasas la naŭzaodoro. Ĝi tamen famas! En la turisma koro de la singapura ĉefurbo, sur placego, staras du grandaj konstruaĵoj kun auditorio, teatroj plej modernaj kaj ĝisdataj pri modaj teatraĵoj. Ĉiu el ambaŭ tegmentoj havas formon de grandega duriano.

Et voilà, en neuf mois on a atteint le bout du monde, pédalé plus de 10 000 km, capté des milliers de photos, perdu une dizaine de kilos chacun, et quelques affaires. Et toujours aussi contents d'être partis.

Mais l'aventure n'est pas finie, maintenant on va aller voir ce qui se passe de l'autre côté du monde...

Jen, en naŭ monatoj ni atingis la terekstremajon, ni pedalis pli ol 10 000 km-ojn, ni kaptis milojn da fotoj, perdis dekon da kilogramoj kaj kelkajn posedaĵojn. Kaj ni daŭre same ĝojas pri nia ĉiutaga aventuro.

Sed ĝi ne jam finiĝis, ni nun vidu, kio okazas je la alia flanko de la mondo ...



No durians



... surmare al Indonezio ...



No pets



<http://horizonto.free.fr/kontakto/kontakto.html>

Cyril Pinardon kaj Rose Sanz



==== Dans notre rubrique ... *peaufinons notre argumentaire* ====

"Jeepable"... (suite et fin – voir "La Informilo" 148)



L'espéranto est finalement l'enfant de toutes les langues, une synthèse de ce que l'esprit humain a mis des siècles à peaufiner ; pas la perfection, mais **la plus efficace** et **la plus internationale** des langues construites.

Le but étant de proposer au monde une langue véhiculaire très largement plus facile à apprendre (au moins dix fois), donc accessible au plus grand nombre, même à ceux qui ont peu de temps à consacrer à l'apprentissage des langues étrangères, ou peu d'occasions de pratiquer avec des natifs.

C'est aussi **une langue équitable**, chacun devant fournir un effort similaire, une langue dans laquelle chacun retrouve des éléments familiers et des éléments étranges car étrangers. Ce qui n'empêche nullement d'apprendre l'anglais selon les besoins professionnels, ou la langue d'un pays d'expatriation.

Et puis, quel plaisir d'apprendre une langue que l'Éducation nationale persiste à refuser, même en option au baccalauréat ! Un pied-de-nez au nationalisme, à l'obscurantisme et au conservatisme.

L'honnête homme du XXI^e siècle se doit d'avoir des notions d'espéranto, comme l'a fort bien dit Tolstoï :

"Les sacrifices que fera tout homme de notre monde européen en consacrant quelques temps à l'étude de l'espéranto sont tellement petits, et les résultats qui peuvent en découler tellement immenses, qu'on ne peut pas se refuser à faire cet essai." (Léon TOLSTOÏ (1828 - 1910), écrivain russe)

Et si le vocabulaire est plus facile pour nous, Européens, ce n'est pas une langue indo-européenne, car c'est **une langue agglutinante** comme le chinois et le vietnamien ; sa plus grande facilité que le français ou l'anglais est une réalité également pour tous les Asiatiques.

Laissons conclure un linguiste :


"La nécessité logique d'une langue internationale dans les temps modernes présente un étrange contraste avec l'indifférence et même l'opposition avec laquelle la majorité des hommes regarde son éventualité. Les tentatives effectuées jusqu'à maintenant pour résoudre le problème, parmi lesquelles l'espéranto a vraisemblablement atteint le plus haut degré de succès pratique, n'ont touché qu'une petite partie des peuples.

La résistance contre une langue internationale a peu de logique et de psychologie pour soi. L'artificialité supposée d'une langue comme l'espéranto, ou une des langues similaires qui ont été présentées, a été absurdement exagérée, car c'est une sobre vérité qu'il n'y a pratiquement rien de ces langues qui n'ait été pris dans le stock commun de mots et de formes qui ont graduellement évolué en Europe."

Edward SAPIR, linguiste américain, *Encyclopaedia of Social Sciences*, 1950, vol. IX, p. 168

kalejdoskopo

... nepre vizitinda !...



“ Mi volas sciigi, ke la *Svisa Muzeo de l' Ludoj*, kie mi laboras, konsentis aldoni Esperanton al la elekteblaj lingvoj por vizitoj kaj laborgrupoj: franca, germana, angla, hispana, portugala, aj nun Esperanto.

Oni povos organizi Esperantajn grupojn, kiu vizitos ĝin. Mi povus kunordigi la aferon, kaj ĉiĉeroni. La vizito daŭras ĉirkaŭ unu horon; aliflanke estas ankaŭ temaj laborgrupoj, kie oni lernas specifajn ludojn (afrikajn, cinajn, romiajn, faraonajn, ktp), kiuj daŭras 90 minutojn inkluzive de la vizito.

La muzeo, en mezepoka kastelo, konservas ĉarmajn ekzemplerojn de ludoj antikvaj kaj modernaj el diversaj landoj (Barato, Afriko, Ĉinio, ktp).

Poste eblas ankoraŭ restadi en la belega parko ĉirkaŭ la kastelo, aŭ partopreni alian programeron, kiel vizito al la proksima *Kastelo de Chillon* (Ŝijon), aŭ *la Alimentarium de Nestlé*.

Eventualaj interesiĝantoj kontaktu *Cesco Reale*, +41-76-2341843, retadreso: cescoreale@gmail.com

Amike,

Cesco Reale cescoreale@gmail.com

Ndlr: La muzeo troviĝas ĉe la bordo de la lago Lemano (Ĝenevo) urbeto *La Tour de Peilz*, proksime de Laŭsanne


Rtejo: <http://www.museedujeu.com>

Literaturaj Konkursoj en Esperanto – PERPIGNAN (Francio)

La asocio **ESPERANTO, KULTURO kaj PROGRESO** prezentas la literaturajn konkursojn organizatajn de franca asocio

" Groupe Poétique et Artistique du Roussillon " (Poezia kaj Arta Grupo de Rusiljono) :

" Poeziaj Ludoj de Rusiljono " kaj " Rusiljona Premio de Verkistoj "



En 2009, pligrandiĝis la nombro da Premioj, kies partopreno eblas **esperantlinve**: la premioj « *René kaj Colette Llech-Walter* », « *Isabelle Robert* », « de Lernejoj » kadre de la « *Poeziaj Ludoj* » kaj la premio « *de Verkistoj* ». Specialaj kondiĉoj por la afrika movado kaj la franclingvanoj.

Maloŝte okazas ke ne-esperantista asocio organizas **esperantajn premiojn**. Gravus, ke ni partoprenu kiel eble plej nombraj, tiel la premioj fariĝos tradiciaj.

<http://sites.google.com/site/konkursojenperpignan>

Jean-François PASSARELLA

Unua teatraĵo - en esperanto - ... en Serbio ! ☆



D-ro Zamenhof ... sur la podio !

En la teatro "*Joakim Vujić*" en urbo Kragujevac, okazis por *Serbia Esperanto-movado*, historia okazaĵo: la unua profesia teatra spektaklo en Esperanto ! ...


Aktoris la skipo internacia -profesia teatra Sceno Shelter- *Saša Pilipović* (Aleksandar Postnikov), aktoro de kragujevacca teatro, *Miĉo Vrhovac* (L. L. Zamenhof), esperantisto el Banja Luka (BiH) kaj *Ljubica Gašparević* (Lidija), aktorino ankaŭ de kragujevacca teatro "Joakim Vujić". Enscenigisto estis *Milić Jovanovic*, membro de grupo Shelter Sceno.

La teatra salonego estis plena. Organizantoj preparis similtanan tradukaĵon por neesperantistoj. La spektaklo estis parto de solena fina vespero de *Internacia Festivalo de Malgrandaj Scenoj*, kiun partoprenis teatroj el *Serbio, Britio, Rumanio, Usono, Italio kaj Makedonio*.

Al la teatra spektaklo, la unua profesia teatraĵo en Esperanto en Serbio, krom la civitanoj de Kragujevac kaj partoprenantoj de festivalo el aliaj landoj, ĉeestis ankaŭ beogradaj kaj kragujevacaj esperantistoj.

Dimitrije Janicic dimjan@sbb.co.yu

fonto: *Ret-Info* <http://www.eventoj.hu>



LA ĜENERALA SEKRETARIO DE UN ALVOKAS POR OLIMPIKA MILITPAŬZO



“Dum alproksimiĝas la 21-aj Vintraj Olimpikaj Ludoj en Vankuvero, Unuiĝintaj Nacioj kaj la Olimpika Movado alvokas ankoraŭ plian fojon al tutmonda ĉesigo de militado dum la daŭro de la Ludoj.



La Olimpika Militpaŭzo alportas esperon de almenaŭ portempa ripozo je perforto kaj armita konflikto. Ĝi ankaŭ tiras atenton al terura paradokso. En la Olimpikoj kaj

tra la tuta jaro, ni prave honoras la elstarajn atingojn de la homa korpo kaj la pozitivajn sociajn valorojn de konkura sportado, inkluzive de teama spirito kaj justeco. Tamen, multe tro ofte, per la buĉado de milito, ni terure damaĝas tiun saman homan korpon kaj ankaŭ niajn komunajn valorojn.

